

ĉap.16 Fari nenion ekstreme...

Fari nenion ekstreme, kaj persisti senageman trankvilon, do kvankam ĉio iras paralele; ni povas vidi ĝian revenon. Jen, objektoj herbe-vegetas, sed ĉiu reiras al ĝia radiko. "Reiri radikon" nomu trankvilo; ĉi tion nomu "reveni sorton",¹⁾ "reveni sorton" nomu konstanto; "koni konstanton" nomu evidento. Se ni ne konas konstanton, ni kapricas malbone. Koni konstanton estas aprobo; aprobo do estas publiko;²⁾ publiko do reĝa (vojo);³⁾ reĝa (vojo) do ĉielo; ĉielo do vojo; vojo do eterna; kaj ĝis morto ni ne kompromitiĝos.

Komentario:

Tiu ĉi ĉapitro montras materialistan metempsikozon. La ideo "Reiru naturon!" estis jam anticipita de Lao-cu.

P.N.

- 1) reveni sorton - retroiri sian sorton.
- 2) publiko - senpartieco.
- 3) reĝo - simbolas publikan konstantan vojon.

ĉap.17 En pratempe subuloj...

En pratempe subuloj ne konis ekziston de superreganto; en sekvanta tempo ili intimiĝis kun ĝi, kaj ĝin honorigis; en sekvanta tempo ili timis ĝin; en sekvanta tempo ili insultis ĝin. Tial se mankas kredo en la popolo, ili povas esti ne kredanta. Ja prokrasteme, jen estimu la vortojn. Sukcesinte la meriton, plenuminte laboron, popolo ĉiu dirus; Ho, mia naturo!

Komentario:

En pratempe popolo vivadis feliĉe. Sed kiam Lao-cu vivis, estisla milita epoko "ĉunĉu". La vorto "ne" en la unua linio mankas en iuj variantoj.

Antikva ĉina popolkanto:

Venas sun', Mi sulkon fosas,
Iras sun', Kaj mi ripozas,
Por la trink', Mi puton boras,
Por la manĝ, ĉe kamp' laboras,
Ja, kion reĝ, ĉe mi valoras.
(Verkinto nekonata, laŭ la traduko de IU)

ĉap.18 La granda vojo pereis...

La granda vojo pereis, do ekestis artefaritaj filantropio kaj justo. Elaperis intelekto, do ekestis grandaj trompoj; tuta parencaro ne harmoniĝis, do ekestis fidelo de filo por gepatroj; ŝtato malordiĝis, do ekestis rojala vasalo.

Komentario:

Ironia insulto kontraŭ la rutino de Konfucianismo kaj kuraĝa protesto al kontraŭsocia hipokrito.

ĉap.19 Interrompu sanktecon...

Interrompu sanktecon kaj forĵetu intelekton, do profito de popolo centobliĝos. Interrompu filantropion kaj forĵetu justecon, do popolo revenos patroamon. Interrompu lertecon kaj forĵetu profiton, do ne povos ekzisti ŝtelistoj. Tiuj ĉi tri¹⁾ eroj, pripensu, nur tio estas modifo de literaturo, sed ankoraŭ ne sufiĉas. Tial atingu la lokon por malkovrigi esencon kaj ĉirkaŭbraki ŝtipon,²⁾ kaj malmultigu privatecon kaj deziron.

Komentario:

La aŭtoritateco de sanktuloj kaj intelektuloj vere malprofitigas popolanojn. Sfelo kaj ekspluato ne ĉesos, dum ni faras produktadon, ne por kontentigi socian bezonon, sed por kontentigi personecan avidon. Lao-cu estis nek radikalisto nek konservativisto, sed reduktisto. Li aspiris al la naiveco de popolanoj en praepoko.

P.N.

- 1) tiuj tri - sankt'intelekto, filantropi-justo, artefar-profito,
- 2) ĉirkaŭbraki ŝtipon - tenadi naivecon.

ĉap.20 Interrompu lernadon...

Interrompu lernadon, do oni ne malĝojus; kiom distancas inter jes kaj hm!? Kiom distancas inter bono kaj malbono? Tamen ne povas ne timi, kion oni timas (por ke oni ne distingiĝu el popolanoj) (vidu ĉap.4); ho, eterne tio¹⁾ neniam finiĝos. Popolamaso ŝajnas, ke ĝoje ĝui luksan festenon; aŭ kiel suriri koitan liton, sed mi la sola ja restas kvieta, jen kiel suĉinfano ankoraŭ ne signas, ankoraŭ ne ekridas; aŭ ja lakadukiĝanta kiel ne trovas sian hejmon. Popolamaso havas superflumon da intelekto, sed mi sola

estas kiel postrestita; mi havas koron de mal-saĝulo, ja ĉu tio estas ĥaose malhela? Fili-stroj ĉiuj estas sagacaj; mi la sola ŝajnas esti malserena. Filistroj ĉiuj estas inspektemaj; mi sola estas ĉagrenema. Ja vastega kvazaŭ maro, ja, kiel flirtas en vento kaj ne havas lokon halti. Popolo ĉiu havas sian celon;²⁾ mi sola estas obstina kaj sovaĝa. Mi sola volas esti abnorma ol aliuloj kaj ŝatas mamnutrigan patr-inon.³⁾

Komentario:

Konfucio diris: "Riĉigi scion kaj ĝin memori ĝustaokaze estas vera korgojo" Sed, Lao-cu deklaris ribelon kontraŭ la filistran mensogeman moralon, proklamante obskurantismon aŭ "Laissez-faire-ismen".

P.N.

- 1) tio - la vojo.
- 2) celo - riĉo kaj honoro.
- 3) mamnutriga patrino - virto pere de la vojo.

ĉap.21 La fazo de senenhava virto...

La fazo de senenhava virto nur sekvas la vojon. La objektiveco de la vojo estas nur rava kaj ĥaosa. Ja en la mezo de ekstazo kaj raveco jen sintrovas la fenomeno. Ja en la mezo de raveco kaj ekstazo jen sintrovas la objekto.¹⁾ Ja en la mezo de mallumo kaj krepusko jen sintrovas la esenco. La esenco estas tre vera; en ĝi sintrovas la konfido; de antikveco ĝis nun la nomo ne foriras; tiel ĝi cenzuras fonton de ĉiuj kaŭzoj. Pro kio mi konas, ke fonto de ĉiuj kaŭzoj estas tiel? Ĉar pro tio ĉi.

Komentario:

Esprimo de neapartigebleco de virto kaj vojo. La vojo en la fenomeno de esto-malesto nature havas formon, objekton kaj esencon.

P.N.

- 1) objekto - la vojo, ĉar ĝi ne estas iluzia sed konkreta, tial nomu objekto.

ĉap.22 Kurba estas perfekta...

Kurba estas perfekta; distordita¹⁾ estas rekta; konkava estas plenigebla; eluzita estas renovigota; malmulta estas aldonata; tro multa estas konfuza. Pro tio sanktulo ĉirkaŭbrakas la unuecon,²⁾ kaj fariĝas la modelo de l' mondo. Li ne sinprezentas, tial publikiĝas; ne sinaprobas, tial publikiĝas, ne fanfaronas, tial havas meriton; ne arogantas, tial longedaŭras; jen nur ne kontestas. Tial en la mondo neniu povas kontesti kun li. Antikva diro "kurba estas perfekta", ho, neniam estas mensoga! Sincere perfektigu kaj revenu al ĝi.³⁾

Komentario:

Lao-cu estis iniciatoro de kvara dimensio aŭ relativeca teorio (vidu ĉap.45). Ĉar li sugestis la distordecon de spaco de l' universo antieŭkrida, nome kuba estas rekta, aŭ rekta linio estas pli longa ol kuba, laŭ la tordo de spaco kaj tempo.

P.N.

- 1) distordita - esti fleksita.
- 2) la unueco - la minimuma unu vojo.
- 3) ĝi - la vojo.

ĉap.23 Senvoĉa parolo...

Senvoĉa parolo estas fazo de naturo, tial eĉ ventego ne finigas matenon;¹⁾ eĉ pluvego ne finigas tagon; kiu faras tion? Estas la naturo. Eĉ la naturo ne povas esti longedaŭra, ĉu homo²⁾ povas des pli? Tial sinokupantoj laŭ la vojo kunagas kun vojo mem; virtulo kunagas kun virto; perdinto kunagas kun perdo. Do, por vojkunulo la vojo ankaŭ plezuras akiri tiun; por virtkunulo la virto ankaŭ plezuras akiri tiun; por perdanto la perdo ankaŭ plezuras akiri tiun. Tamen, se al tiu mankas fido, oni ne konfidas!

Komentario:

Nur tiu, kiu kapablas fari "senvoĉan parolon" povas influi aliulojn.

P.N.

- 1) ne finigi matenon - ne povas daŭri ĝis la fino de mateno.
- 2) ĉu homo... - kompreneble homo ne povas esti pli longedaŭra.

ĉap.24 Piedpinte-staranto...

Piedpinte-staranto ne staras; larĝpaŝe-iranto ne iras bone. Memvidiganto ne montras klare. Memaprobanto ne publikiĝas. Mematakanto ne meritas. Memfanfaronanto ne longedaŭras (vidu ĉap. 22). Tiu en la vojo, ja diru tromanĝanta ĝibago;¹⁾ la vojo malamuzas tion, tial vojhavanto ne lokiĝas tie!

Komentario:

La tre konata saĝa vidpunkto de etiketo tie ĉi koincidas kun la ideo de la vojo.

P.N.

1) ĝibago - ne necesa ago.

ĉap.25 La vojo sintrovis...

La vojo sintrovis kaj miksiĝis antaŭ ol la mondo. Ja kvieta, ja silenta. Ĝi sendependas kaj ne reformiĝas; cirkuliras¹⁾ kaj ne kompromitiĝas. Ĝi povas esti la patrino de l' mondo. Ni ne konas ĝian nomon; ĝin alinomu la vojo; trudeme ĝin nomu: grando; grandon diru foriro;²⁾ foriron nomu malproksimo; malproksimon nomu reveno. Tial vojo estas grando; ĉielo estas

granda; tero estas granda; reĝo³⁾ ankaŭ estas granda. En tiuj regionoj estas kvar grandoj,⁴⁾ kaj reĝo lokiĝas en unu el ili! Homo laŭregulas la teron; tero laŭregulas la ĉielon; ĉielo laŭregulas la vojon; vojo laŭregulas la naturon.

Komentario:

Metafizika kaj abstrakta esprimo de kosmo kaj ĝia regulo, en komparo kun la homa vivo. "Reĝo" ne signifas regnestron, sed vojtenanton, kiu kategorias laŭ la ordo de "eraro, racio, regulo, rajto, naturo," kiuj serie konkeras unu post alian.

P.N.

- 1) cirkuliri - tra la kosmo.
- 2) foriro - ĉirkaŭ kosmo.
- 3) reĝo - la estimato de l' popolo.
- 4) kvar gradoj - grado, foriro, malproksimo, kaj reveno - esenco de kosmo.

ĉap.26 Pezeco estas radiko...

Pezeco estas radiko de malpezeco; kvieta estas reganto de bruo;¹⁾ pro tio sanktulo vojaĝante tutan tagon ne foriras de proviantvagono,²⁾ kvankam sintrovas vidindaĵo, sidas sindeteneme supereme. Kiel la ĉefo de miriadkavalerioj³⁾

povus sin frivoliĝi je la mondo? Se frivola, nome perdus siajn vasalojn; se bruema, nome perdus regantecon.

Komentario:

Pezeco signifas malfrivolecon, nome diskreton aŭ prudenton skrupulan, kaj kvieteco stabila ankaŭ havas samsignifon. Tion Lao-cu rekomendas kiel konduton de virtulo.

P.N.

- 1) bruo - frivoleco.
- 2) proviantvagono - por karavano.
- 3) ĉefo de miriadkavalerioj - reĝo de regno.

ĉap.27 Bona iranto ne postsignas...

Bona iranto¹⁾ ne postsignas. Bona parolanto ne fiaskas, kaj bona kalkulanto ne uzas abakon. Bona fermanto fermas sen seruro, tamen ne estas malfermebla. Bona liganto sen ŝnurlige ligas, tamen ne estas malligebla. Pro tio sanktulo ĉiam bone savas homojn. Tial ne estas forlasataj. Ĉiam bone²⁾ savas aĵojn. Tial ne estas forlasaĵoj. Ĉi tion nomu praktika ekonomio. Ĉar bonulo estas instruanto de nebonulo; nebon-

ulo estas helpanto³⁾ de bonulo. Se ne respektus la instruanton, kaj ne amus la helpanton, kvankam intelekta, estus granda konfuziĝo. Ĉi tion⁴⁾ nomu grava delikato.⁵⁾

Komentario:

Ekonomio ĉiam devas koincidi kun la vojo de l' universo. Tio estas bono en vera signifo.

P.N.

- 1) bona iranto - praktikanto de la vojo.
- 2) ĉiam bone - egale.
- 3) helpanto - materialo, bazo.
- 4) ĉi tion - scii tiun rezonon.
- 5) grava delikato - grava kvintesenco.

ĉap.28 Se oni scius virecon...

Se oni scius virecon¹⁾ pozitivan, kaj persistus inecon²⁾ negativan, fariĝus valego de l' mondo. Fariĝinte la valego de l' mondo, ĉiama virteco ne forirus kvazaŭ revenus suĉinfanon. Sciante intelekton kaj persistus malsaĝecon, do, fariĝus modelon de l' mondo; fariĝinte modelon de l' mondo, ĉiama virto ne erarus; kaj revenus al ekstermo de nenio; konus la gloron kaj persistus la ofendon, do, fariĝus la valegon

de l' mondo; fariĝinte la valegon de l' mondo, tiam la ĉiama virto sufiĉus, kaj revenus al la ŝtipo;³⁾ la ŝtipo, se sidiĝus, nome farus kapablulon. Sanktulo ĝin uzus kiel la ĉefo de registaro. Tial la grandioza organizo⁴⁾ ne fendigas la ŝtipon sovaĝan.

Komentario:

Ŝtipo signifas ne-artefaritan kaj virtan naivulon, kiel la rustikan plumpecon de elhakita ŝtipligno. Se el ĝi oni faros kapablulon artefare, tiu fariĝos ĉefo de registaro, tial ne fendu la ŝtipon, sed lasu ĝin kiel ĝi estas.

P.N.

- 1) vireco - vigla, forta, kuraĝa.
- 2) ineco - gracia, milda, afabla.
- 3) ŝtipo - sovaĝa materialo, fenomeno de l' vojo (vidu ĉap. 15, 19, 32, 37, 57).
- 4) grandioza organizo - kosmo.

ĉap.29 Iu intencos preni...

Iu intencos preni la mondon, kaj farus tion; mi vidas ke tiu nur ne akiros. La mondo estas spiritaĵo, do ne eblas regi! Regonto ĝin rompos; prenonto ĝin perdos. Ĉiuj objektoj aŭ iras, aŭ postsekvas, aŭ blove varmigas, aŭ blove

malvarmigas, aŭ fortigas aŭ malfortigas, aŭ surmetas, aŭ faligas; pro tio sanktulo forigas eksceson; forigas lukson; forigas trankvilon.

Komentario:

Kontraŭ aŭtoritateca konkero de l' mondo. En tiu ĉi ĉapitro la kontraŭ-perfortismo de Lao-cu disrompis heroismon.

ĉap.30 Kiu asistas popolestron...

Kiu asistas popolestron per la vojo, tiu ne potencigas la mondon, nek soldatojn. Jen, ĉio estas reduktema.¹⁾ Tie vegetas dornoj, kie estis armeo! Post granda milito certe oni havas malbonjaron, tial bonulo rezulte ĉesas! Sed ne prenas perforton kuraĝe! Rezulte ne estu fanfarona; rezulte ne estu konkerema; rezulte ne estu aroganta; rezulte ne povu ĉesi; rezulte ne estu forta; ĉiuj viglaj homoj maljuniĝos. Ĉi tion diru kontraŭvojo; kontraŭvoja baldaŭ ĉesos.

Komentario:

Jen, antimilitarismo kaj kontraŭ-perfortismo de Lao-cu. Tio estas pacifismo, sed samtempe ĝisfunda rezisto kontraŭ aŭtoritato.

P.N.

- 1) reduktema - pro la koncerno de kaŭzo kaj rezulto.

ĉap.31 Jen lertaj soldatoj...

Jen lertaj soldatoj estas iloj de malfeliĉo; iuj ilin malamas, tial vojhavanto ne lokiĝas tie, pro tio virtulo ŝatas sidi maldekstre; por operacio armea ŝatas dekstron. Armeo estas ilo de malfeliĉo, sed ne estas ilo de virtulo; kvankam oni uzus ĝin ne eviteble, ne persista estas plej bona; kvankam venkus, tamen ne estas bela! Tiu, kiu tion vidas bela, estas amuzanta hommortigon! Jen, amuzanto de hommortigo ne povas reputaciĝi en la mondo! Tial en feliĉa afero oni ŝatas maldekstran flankon, kaj por malbonafero dekstron. Pro tio vicmarŝalo lokiĝas maldekstre kaj ĉefmarŝalo lokiĝas dekstre. Ĉar tio signifas, ke ili etiketas en la maniero de funebro. Mortiginte multamase, do, kun malĝojkompato priploras; venkinte militon, nome etiketas en la maniero de funebro.

Komentario:

Tiu ĉi ĉapitro estas Kontraŭmilita dek-

laracio antaŭ 2300 jaroj; instruo kaj sarkasmo al marŝalo, homon-mortiganto. Laŭ ĉina kutimo oni rigardas dekstron negativa kaj maldekstron pozitiva.

ĉap.32 La vojo estas ĉiama...

La vojo estas ĉiama kaj sennoma; la ŝtupo¹⁾, kvankam malgranda, la mondo ne kuraĝas vasaligi. Se reĝo povos gardi, ĉio estos gastigonta. Cielo kaj tero harmoniigos kaj faligos dolĉan roson; popolo ne-ordonite mem egaliĝos; la sistemo unuafoje havos nomon; la nomon jam havas, do sciigos la finon; scii halti estas kialoesti ne kompromitita; metafore, ke la vojo ekzistas en la mondo, estas kvazaŭ riveroj kaj valoj je riveregoj kaj maroj.

Komentario:

La esenco de l' mondo devas esti la naiva ne-kulturita virto kvazaŭ virga ŝtupo.

P.N.

- 1) ŝtupo - vidu ĉap. 15, 19, 28, 37, 57